


# la naska fasko

Numero dek  
2009-07-10  
vendredo

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

## Kio okazos semajnfine?

- ★ **Vendredon, 2:30 ptm:**  
**komuna kantado kun Ŝajo en la lingvolaboratorio (en AP&M)**  
La kantaro inkluzivos la kantojn *La Espero* kaj *La Vojo* de ZAMENHOF, *Masko* de Kajto, *La virbovo kiu ekamis la lunon* de JoMo, kaj aliajn, se vi deziras.
- ★ **Sabaton: datrevenaj ceremonioj**  
Por soleni la 40-an jaron de NASK, okazos du eventoj kun la estraro de nia ĉefa subtenanto, la fonduso ESF (*Esperantic Studies Foundation*):
  - **1:30 ptm: Simpozio**  
AP&M 4301
  - **4:00 ptm: Ceremonio**  
Konferenco-centro *Eucalyptus Point* (vidu mapon dekstre). La evento estos malfermita al la publiko.
- ★ **Dimanĉon, 10:00 atm:**  
**Ekskurso al la urbocentro de Sandiego**  
Rendevuu antaŭ la loĝejo *Asante*, kaj ni kune iros por trafi buson. En la urbo ni disiĝos kaj oni povos iri laŭvole al diversaj vidindaĵoj.



## Langotordiloj

La jenajn sendis Niko, kiu trovis ilin en la retejo [omniglot.com](http://omniglot.com):

- Ĉu ŝi scias, ĉu ĉi-scene la sklavo ŝtelas la sceptron?
- Serpo servu cin por ĉerpo el cerbo de serba cervo.



## Nova artaĵo

de Ellen EDDY

Malantaŭ la kafo-tendo de *Fairbanks* en la konstruaĵo *Social Studies* oriente de la vojo *Ridge Walk* apud nia loĝloko estas nova rokskulptaĵo kiu honoras la afrikan kontinenton. Muziko, bestoj kaj homoj estas reprezentataj diversflanke. Ne estas klarigo pri la artisto aŭ la skulptaĵo do oni povas nur diveni.

## Kiel la merkato influas, en kiu lingvo vi legas

el la ĵurnalo *New York Times*

de Daniel HAMERMES

tradukis Micah BALES

Miaj amikoj nederlandaj diras al mi, ke ili legas fremdajn (ne-nederlandajn) romanojn, kiujn oni tradukas en la anglan ansataŭ en la nederlandan.

Ilia scipovo de la angla estas tre bona, sed ilia scipovo de la nederlanda estas klare supera. Do, mi demandas, kial legi anglingve?

Ilia respondo estas simpla: Konsideru romanon originale verkitan svedlingve, kiel la mirindan *Knabino Kun La Tatuo De Drako*, de Steig LARSSON. Se oni tradukus ĝin en la nederlandan, ĝia merkato—kaj profito—estus multe malpli granda kompare kun anglingva traduko, pro la relative malgranda kvanto da nederlandlingvanoj.

Tia malgranda profito allogas tradukistojn, kiuj ne estas tiel bonaj ol tiuj, kiuj tradukas libron en la anglan.

Miaj amikoj diras ke ili preferus legi brilan tradukon en lingvo, kiun ili bone konas, eĉ ne perfekte, ol mezkvalitan tradukon en sian denaskan lingvon.

## Limeriko de falsaj amikoj, Parto IV

de Anonimulo

Lia agonio estis tra gaso

Kiam la konsekvenco de lia poliso

Rezultis en la aktualaj rezultoj

De mislokita DDT por la lokustoj

Alvenintaj sen demando ĉe la stabejo de la polico.

### Ĉu vi instruis, instruas, aŭ instruos Esperanton?

Se jes, vi rajtas iĝi membro de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto kaj ricevi ĝian kvaronjaran Bultenon.

Por pli da informo, petu Doroteon HOLLAND (Cuzco 112).

## La Insulo de la Rozoj reviviĝas sur la ekrano kaj re- elakviĝas ĉe Rimini

**La bolonja inĝeniero Giorgio ROSA [Ĝorĝo Roza] deklaris sendependecon de la itala ŝtato en Majo 1968.**

(Elitaligis Marko MENICHETTI el artikolo en La Repubblica de la 3-a de Julio)

Por la turistoj ĝi estis eksterordinara allogaĵo en sia ĝenro; por la ĵurnalistoj ĝi estis amuza kaj bizara afero, kaj por Giorgio ROSA kaj la italaj aŭtoritatoj ĝi estis terure serioza afero. Estis kvarcent-kvadrat-metra platformo kiu, en somero de 1968, perturbis la dormon al multaj homoj, specife kiam tiu platforma strukturo sin proklamis Respubliko sendependa de Italujo. Post kvardek jaroj, dokumenta filmo rakontas la historion de la “Insulo de la Rozoj”, kaj ĝuste antaŭ kelkaj tagoj la submarajn restaĵojn de tiu strukturo elakvigis la subakva klubo de Rimini.

Somero 1968. “La Insulo de la Rozoj” estas revo al kiu la bolonja inĝeniero Giorgio ROSA sin dediĉas de longe, almenaŭ de dek jaroj, ekde kiam kune kun sia edzino li ekentreprenis projekton de artefarita platformo. La ferbetonaj laboroj daŭris plurajn jarojn, kaj en 1967 okazis la malfermo al la publiko. Tiu ĉi estas komence la Insulo de la Rozoj: turisma allogaĵo, facile atingebla de la marbordo, ĉar ĝi troviĝas nur ses mejlojn for, eĉ ne dekdu kilometrojn.

Fine Giorgio ROSA sukcesas realigi sian planon: la 1-an de Majo 1968 la artefarita insulo deklaris sendependecon de la itala ŝtato, kaj s-ro ROSA iĝas prezidento de ĝi



kaj elektas Esperanton kiel oficialan lingvon. Estas emisiitaj poŝtmarkoj, montrantaj la oficialan blazonon de la “Esperanta Respubliko de la Insulo de la Rozoj”: tri ruĝajn rozojn konsideritajn hodiaŭ raraĵo de la filatelululoj.

Tio ĉi por la italaj aŭtoritatoj vere estas tro. La minacoj fare de la havenadministrado de Rimini, dum konstrufazo, ne sukcesis; kaj nun oni troviĝas kun ŝtato sin deklaranta aŭtonoma, kvankam jam en internaciaj teritoriaj akvoj. Je la unua taglumo de la 25-a de Junio 1968, 55 tagojn post la deklaro de sendependeco, taĉmento da policianoj ĉirkaŭas la platformon kaj akiras posedon de ĝi sen perforto.

La Registaro de la Insulo de la Rozoj protestas, skribas ankaŭ al la prezidento de Itala Respubliko.

Nenio farendas: en Januaro 1969 la itala ŝiparmeo metas eksplodaĵon por faligi la platformon. Pluraj klopodoj ne sufiĉas,



sukcesos poste marŝtormo de la 26-a de Februaro 1969 subakvigis la “Insulon de la Rozoj” kaj kun ĝi la revojn de Giorgio ROSA.

Kvardek jarojn poste, la la restaĵoj de tiu strukturo reelakviĝas, samtempe kun la apero de la dokumenta filmo, kiu rakontas pri la tuta historia evento:  
<http://www.isoladellerose.it/foto.htm>

*Kromaj informoj pri la Insulo de la Rozoj troveblas ĉe Vikipedio. Rimarkindas ke la informoj en la itallingva sekcio estas pli vastaj kaj detalaj.*

[http://eo.wikipedia.org/wiki/Insulo\\_de\\_la\\_Rozoj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Insulo_de_la_Rozoj)  
[http://it.wikipedia.org/wiki/Isola\\_delle\\_Rose\\_\(micronazione\)](http://it.wikipedia.org/wiki/Isola_delle_Rose_(micronazione))

## Restu sane, NASKanoj!

de Ellen EDDY

Ni bedaŭras la mispaŝon de Juan mardon sed ni eksciis ion valoran. La studenta sanservo efektive ne servas niajn studentojn ĉi-jare. Pro ekonomia kialo, la sanserva buĝeto ne inkluzivas helpon por someraj studentoj, nur plentempaj. Se vi bezonas urĝan prizorgon, iru al la Urĝa Klinikio kiu estas parto de la Urĝa Centro ĉe la malsanulejo *Thornton* ĉe la orienta flanko de UCSD. Mapoj troviĝas en la komuna ĉambro por helpi vin trovi la lokon.

## Penso

de Vido GILLET

Kion signifas *taro*?

La unua signifo en Esperanto estas “materialo uzita por pakado,” sed *taro* povas estas ankaŭ kolokazio—planto kultivata en la tropika zono.

Do kion signifas “tari”?

Ĉu tiu, kiu tarus estus tarantulo?

*La NASKan Faskon redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas viajn kontribuojn!** Se vi ne sentas vin komforta pri verkado, ne timu; li helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun, efektive, li senpacience kaj avida atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... Sendu materialojn rete al **<nask.esperanto@gmail.com>** aŭ portu ilin piede al Asante #127.*